

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 230</i> <i>dec. / 2010</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm</p>		

Imre Szabo (Hungarujo)



Novembrigas

Auror' viola
plenŝprucas niajn tagojn—
aŭtuno velkas,
sekvas nur monstro blanka
en vento disblovanta.

Nia animo
preĝas al eternulo:
donu la ŝancon
por renoviĝi forte,
por renoviĝi forte.



Per ĉiela farbo
verkas la Aŭtoro,
oriĝas pejzaĝo
sur tera pentraĵo.

Falintaj kaj flavaj,
folioj multiĝas,
la branĉoj kalviĝas,
belegan vestaĵon
arbaroj forĵetas.

Subaj arbfolioj
lastafoje dancas,
poste kiel kampo
ili kune brunas,
per tabaka bruno
jam finadiaŭas.

Varmkolora robo
rapide iĝas rubo,
dormema kovrilo
kuŝas sur la tero.

Anna Karlik (Hungarujo)



Fino de Oktobro

En tiu monato
senfortas la suno,
jam estas aŭtuno,
ŝatata sezono,

Pli kaj pli malvarme
alvenas aŭroro,
flugas en aero
fluma bonodoro.

Nekonataj paŝoj
ĉi tapiŝon tretas,
sensukaj folioj
krake susuras.

Al tiu muziko
nur la vento fajfas,
pri laca naturo
jena bildo plaĉas.

Plaĉas tiu bildo
pri laca naturo,
sed mutigas birdon

profunda funebro.

Kiel kondolencus
oferitajn fruktojn,
nenio lumigas
la malhelajn noktojn.

Tamen etaj fajroj
subite bruliĝas,
estimom vivantoj
per ili esprimas.

Kandeloj lumigos
la plej nigrajn noktojn,
buketoj ornamos
memorigajn tombojn.

Komencan pereon
pluveto priploras,
grizan horizonton
la nebulo kaŭzas.

Wisława Szymborska (1923-)



LA AFABLECO DE
LA NEVIDANTOJ

La poeto legas versojn al la nevidantoj.
Li ne supozis, ke estos malfacile .
Tremas la voĉ'
Tremas la manoj.

Li sentas , ke ĉiu frazo
elmetitas je provo de l' obskuro.
Ĝi devas aranĝi sin mem
sen koloroj kaj lumoj.

Danĝera aventuro
por steloj en liaj versoj,
por l' aŭroro, la ĉielarko, la nuboj, la luno,

por la fiŝo tiel arĝenta sub akvo
kaj la nizo silenta alte en ĉielo.

Li legas – tro tardas por ne legi-
pri knabo en flava vent-jako sur verda herbejo,
pri ruĝaj tegmentoj dissemataj en la valo,
moveblaj numeroj sur ĉemizoj de l' ludantoj,
kaj nuda nekonatino en la pordo nefermita.

Li volus prisilenti, sed ne eblas,
ĉiujn sanktulojn sur preĝeja volbo,
ĉi adiaŭan geston el vagon-fenestro,
ĉi vitron de mikroskopo kaj ringo-radion,
L' ekranojn, la spegulojn, la vizaĝojn en
albumo.

Sed grandas l' afableco de la nevidantoj,
ilia komprenemo kaj grandanimeco.
Ili aŭskultas, ridetas kaj aplaŭdas.

Iu el ili eĉ alproksimiĝas
kun la libro aperta inverse
petante aŭtografon, kiun ne vidos .



esperantigis

Helena Tyłipska (Italujo)

*Mi dediĉas ĝin al nevidantaj amikoj
Esperantistoj el Ipernity*

Vejdo (Ĉinio)

Vintraĵ Hajkoj



Ululas vento
Tra kampoj kaj arbaro
El okcidento

Neĝeroj flirtas
Arĝenta la pejzaĝo
Vivece bildas

Sporadas homoj

Irantaj sur la stratoj
Sub neĝaj vomoj

Ne movas roĵo
Kuŝanta sub glacio
Jen kun malĝojo

Junuloj brue
Aktivas kun vikleco
Kantante ĝue

Alportas vere
Varmecon ili ja al
Silent' surtere

Maristo (Rusuĵo)



Sentitole

Humoro por la poezi',
Mi perdis ĝin en urba bruo
Kaj komenciĝis malkonstruo
De la ekzista iluzi'.

Revante blinde en senlum'
Konstruis mi kastelojn pensajn -
Imagojn vanajn kaj maldensajn,
Blovitajn per la palpebrum'.

Realo vokas min eksteren
En mondon sen sentema kor',
En kiu arta senlabor'
Konduki povas nur subteren.

01.10.10

Jen - fina disiĝo,
Ne plu vi aspiras al mi.
Neniam kuniĝos
Por dormi en amharmoni.

Mi sentas angoron,
Ĝi fluas de kapo al kor',
Kaj nur rememoro
Vokiĝas per mia dolor'.

Disparte ni iros
Tra vivo. Malestas futur'.
Ne plu ni admiros
La amon. Estiĝis la mur',
01.11.10

Cecília Meireles (1901-1964)

Pereo

Al ŝip' mi fidis mian revon,
la ŝip' al mar', ne por navigi.
Ke l' rev' pereo miaj manoj
breĉon al mar' ne tardis igi.
La manoj, ankoraŭ malsekaj,
bluvenas el ondkvazaŭvundo,
kaj l' kolor' gutfale de l' fingroj
farbos l' aridecon de l' grundo.
Elfora vento proksimiĝas,
la nokton skurĝos tuj la vip'.
Vanue pli kaj pli sub l' akvon
jen mia rev', ene de ŝip'...
Ke la maro ne ĉesu kreski
multploros mi kvazaŭ pro devo,
kaj ke l' ŝipo trafu la fundon,
kaj malaperu mia revo,
Poste, ĉio perfekte statos:
ondoj kaj plaĝo jam ebenaj,
roke-sekaj miaj okuloj,
kaj miaj du manoj forsvenaj.



Esperantigis

Wel (Brazilo)



Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)



Sinjoro Donggǔo kaj Lupo

ĉina antikva fablo

—laŭ ĉineska skemo Linjiang-xian*

Donggǔo estis vere
multescia sinjor',
sed kun pedanta odor'.
Neni' krom libroj
en lia memor'.

Iutage vojaĝis
li kun libera kor'
kaj sak' da librotrezor'
por la oficon
en la metropol'.

Duonvoje lupo
alkuris subite
kaj diris senhezite
"Sinjor', mi vere
forkuras glite

de mava ĉasisto,
kiu ja rapide
persekutas min ŝvite.
Kaj sagon trafis
mi,ve, vundite.

Ĉu mi povus kaŝi
min en la librosak'?
Se libere de atak'
lia, mi certe
vin dankos per pag'!"

Kompreneble li ja
sciis pri lupa plag',
sed li lupon en fuĝ-vag'
vidante naskis

kompaton de svag'.

"Kvankam mi ofendos
ĉasanton kun konsci',
mi savos kun simpati'
vin pro via pet'
el la tragedi'."

Do li malplenigis
la sakon jen por ĝi.
Je l' kriza situaci'
ĝin en la sakon
haste vokis li.

La lup' sin kuntiris
malgranda kiel bul'.
La sinjor' ĝin sen skrupul'
metis en sakon,
ligis ĝin per ŝnur'.

Baldaŭ la ĉasisto
al li venis per kur'
kaj serĉis por ĝia spur'.
Li demandis lin
"He, vi maljunul',

ĉu vi vidis lupon?
Kien ĝi timplene
forkuris plor-miene?"
Donggǔo respondis
balbute jene,

"Estas multaj vojoj.
Eble ĝi malbene
forfuĝis rekte pene
laŭ tiu vojo
ĝis tute svene."

La ĉasist' lin kredis
kaj ĉasis ĝin jam for.
La lupo en sak' kun plor'
petis al Donggǔo,
"Karega sinjor',

lasu min eliri
pro via milda kor'.
Mi ja pro via favor'
dankos senfine
per ĉia trezor'."

Tiuj dolĉaj vortoj
konfuzis lin tute.
Li l' sakon miskondute
apertis tuje
tiuminute.

Tuje el la sako
lupo senbalbute
diris, "Mi vin salute
danku pro l' savo.
Nun min altrude

ekronĝas malsato.
Kial vi ne vole
lasu min manĝi fole
jen vian karnon
por mi konsole?

Faru al mi plian
favoron bonvole."
Ĉe tio fort-muskole
ĝi sin ĵetis al
Donggūo malmole.

La sinjoro luktis
kun la lupo pene.
Tiam kampul' promene
preterpasis kun
ŝpato man-tene.

Danggūo lin haltigis
kaj petis ĉagrene
al li juĝi konvene
pri pravig' de l' lup'
mava venene.

La kampulo diris,
"Viajn vortojn ne mi

kredas jen kun garanti'.
Ĉu tiu sako
tre malgranda, fi,

povus enteni ĝin
de tia dimensi'?
En sakon vin ŝovu vi
kaj mi atestu
pri l' situaci'."

La lupo sin ŝovis
en sakon kun konsent'.
La kampulo de prudent'
ligis sakbuŝon
ŝnure dum moment'.

Li diris al Donggūo,
"Vi kun bonkora sent'
ne devas en evident'
konduki ŝafe
al lup' sen atent'.

Ne ŝanĝas naturon
tia best' karn-vora.
Kiel sekvo horora
se vi kompatas
lupon mildkora!"

Ĉe tio li svingis
la ŝpaton dur-vola
antaŭ Donggūo stupora,
kaj batmortigis
lupon pulvora.



**Linjiang-xian (feo ĉe rivero): ĉina fiksforna
poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 66,7,55
laŭ rimarangō xa,a,xa (x=senrima)*

Lily (Ĉinio)

Ne forgesu min

—laŭ ĉineska skemo Chaitoufeng*

post amor'
kun langvor'
mi konscias pri trezor'
ampasi'
kaj mani'
bezoniĝas
en sent-seri'
mi, mi, mi

post tru-bor'
ĝoj' en kor'
ne forgesu pri valor'
miaj pi'
kaj ĝemkri'
enkapiĝu
kun emoci'
vi, vi, vi

Cindy Mckee (Usono)



Abundo de Vejdo

(pensoj en okazo de naskiĝtago de Vejdo,
22-10-2010)

—laŭ ĉineska skemo Chaitoufeng

Vejdo nun
versas kun
lerto en monda komun'.
Eĉ aer',
atmosfer'
pli ĉineskas,
sur nia sfer',
ter'
ter'
ter'!

Pri la lun'

pri la sun'
li jam versis en la jun'.
En somer'
de afer'
nomita viv',
Li versas per
kler',
kler',
kler'!

Chaitoufeng (feniksa harpinglo): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1, 1* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

Yanke (Ĉinio)

Vintra luno

—laŭ ĉineska skemo Xijiangyue*

vintra lun' en nebul'
brilas treme en svag'
super frida akv' de lag'
kvazaŭ bild' en imag'

vintra lun' en fumo
flosas en glita vag'
ĝis la krono de kratag'
ĉe l' montvoja zigzag'.

*Xijiangyue (luno super okcidenta rivero): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Eto (Ĉinio)

Umeo disfloras

—laŭ ĉineska skemo Yijianmei*

bunte en vintra rigor'
ekdisforas
sub suna glor'
ruĝaj, flavaj kaj blankaj
umefloroj

kun bonodor’

homoj kun serena kor’
aprecas kaj
laŭdas en ĥor’
per klakado de l’ lango
jen pri arom’
jen pri kolor’

**Yijianmei (branĉo da umefloro): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun ses versoj de 7,44,744 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)*

Sero (Ĉinio)

Falanta folio

—laŭ ĉineska skemo Yugezi*
ŝvebas foli’ en aer’
malsupren al la river’
sen konsci’
kun leĝer’
al ondmortiga danĝer’

Cindy Mckee (Usono)

Falinta folio

—laŭ ĉineska skemo Yugezi
Krispita, eluzita,
turnita, konfuzita
mi ondas
skurĝita, kontuzita,
ĉu fine, rifuzita?

**Yugezi (fiŝista kanto): ĉina fiksfirma poemo el 5 versoj de 7,7,33,7, silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)*

Yanke (Ĉinio)

Urbo en sonĝo

—laŭ ĉineska skemo Tasuoxing*
grizo kovras

ĉion nure
staras blokoj konture
betonaj kaj ferŝtalaj
malvarmsente kaj dure

homamaso
hastas kure
por manĝaĵoj konkure
mankas intersalutoj
intimeco—senspure

**Tasuoxing (paŝo sur herbo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 44,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)*

Rakonto pri beleco

—laŭ ĉineska skemo Haoshijin*

ŝajne alvenis
vi al mi leĝere
kun aminda mien’
jen enaere

kiel blanka nubero
tiam espere
mi atendadis vin
ĉiam sincere

jen ekde tiam
mi ne malplenis plu
vi jam min konkeris
kaŝite sen bru’

mi vidis vin surstrate
rakont’ pri ni du
ekis kun belaĵo
jen en kontinu’

**Haoshijin (proksimiĝas bona afero): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)*



Maupassant (1850-1893)



LA PLUVOMBRELO

Al Camille Oudinot

SinJORINO OreLO estis ŝparema. Ŝi konis la valoron de unu soldo, kaj posedis armilaron da severaj principoj koncerne la monmultobligon. Evidente, ŝia domservistino penegis por pleniĝi la bazarkarbon; kaj S-ro OreLO obtenis sian poŝmonon nur kun ekstrema malfacileco. Tamen, ili komforte vivis, kaj ne havis infanojn; sed S-ino OreLO sentis veran doloron, kiam ŝi vidis eliri la monerojn de sia hejmo. Tio estis kiel korŝiro; kaj ĉiufoje kiam ŝi devis elspezi kelkan monsumon, kvankam nepre necesan, ŝi tre malbone dormis la sekvantan nokton.

OreLO senĉese ripetis al sia edzino:

– Vi devus esti pli donacema, ĉar neniam ni forkonsumas enspezon.

Ŝi respondis :

– Neniam oni scias tion, kio povas okazi.

Preferinde estas posedi pli multe ol malpli.

Ŝi estis malgranda kvardekjara virino, vigla, sulkiĝanta, pura kaj ofte incitita.

Ŝia edzo, ĉiumomente, plendis pro la seniĝoj, kiujn ŝi suferigis al li. Estis iuj, kiuj fariĝis al li aparte tedaj, ĉar ili tuŝis lian vantemon.

Li estis ĉefa komizo en la milita Ministerio, kaj li restadis tie nur por obei al sia edzino, por pligrandigi la neutiligitajn rentojn de la hejmo.

Nu, dum du jaroj, li venis al la oficejo, kun la sama flikita pluvombrelo, kiu ridigis liajn kolegojn. Tedita pro iliaj mokaĵoj, li postulis, ke S-ino OreLO aĉetu al li novan pluvombrelon. Ŝi aĉetis al li unu, kiu kostis ok frankojn kaj kvindek centimojn, la rabatan artiklon de granda magazeno. La oficistoj,

ekvidante tiun objekton, kiu multnombre svarmis en Parizo, rekomencis iliajn ŝercojn, kaj OreLO abomeninde horore suferis pro tio. La pluvombrelo senvaloris. Post tri monatoj, ĝi estis eksterserva, kaj la gajeco fariĝis ĝenerala en la Ministerio. Oni komponis eĉ kanzonon, kiun oni aŭdis dum la tuta tago, de la supro ĝis la malsupro de la vastega konstruaĵo.

OreLO, incitegita, ordonis al sia edzino, ke ŝi elektu novan pluvombrelon, el fajna silko, je dudek frankoj, kaj ŝi alportu al li la aŭtentikan fakturon.

Ŝi aĉetis unu je dek ok frankoj, kaj transdonante ĝin al sia edzo, ruĝa pro kolero, ŝi deklaris :

– Vi havos ĝin almenaŭ kvin jarojn.

OreLO, triumfanta, atingis veran sukceson en la oficejo.

Kiam vespere li revenis hejmen, lia edzino, ekrigardante per maltrankvila okulo la pluvombrelon, diris al li:

– Vi ne devus lasi ĝin kumpremita per la kaŭĉuka ŝnureto, tio estas la plej bona rimedo por facile tranĉi la silkon. Vi devas atenti pri ĝi, ĉar mi ne aĉetos baldaŭ alian al vi.

Ŝi ekprenis ĝin, malagrafis la rubandon kaj forskuis la plisojn. Sed ŝi restadis frapata pro la emocio. Ronda truo, granda kiel centimo, aperis (al ŝi) meze de la pluvombrelo. Estis cigara bruldifekto!

Ŝi balbutis :

– Kion ĝi havas ?

Ŝia edzo trankvile respondis, ne rigardante:

– Kiu, kio ? Kion vi volas diri ?

Nun la kolero sufokis ŝin; ŝi ne plu povis paroli :

– Vi... vi... (bi) bruligis... vian... vian... pluvombrelon. Sed vi... vi... vi do frenezas!... Vi volas sengroŝigi nin !

Li sin turnis, sentante sin paliĝi :

– Kion vi diras?

– Mi diras, ke vi bruligis vian pluvombreton. Jen!...

Kaj, impetante al li, kvazaŭ por bati lin, ŝi violente metis la etan cirklan bruldifekton sub lian nazon.

Li restadis konfuzegita antaŭ tiu bruldifekto, balbutante :

– Tio, tio... kio estas tio? Mi ne scias! Nenion mi faris, nenion, tion mi ĵuras al vi. Mi ne scias kion ĝi havas, tiun pluvombreton!

Nun ŝi kriis :

– Mi vetas, ke vi ŝercis per ĝi en via oficejo, ke vi ludis la ĵongliston, ke vi malfermis ĝin por montri ĝin.

Li respondis :

– Mi malfermis ĝin nur unufoje, por montri kiom ĝi estis bela. Jen la tuto. Tion mi ĵuras al vi.

Sed ŝi furioze piedfrapis, kaj ŝi faris al li geedzan scenon, unu el tiuj, kiuj igas la familian hejmon ankoraŭ pli timinda, por pacema viro, ol batalkampon, kie pluvas la kugloj.

Ŝi alĝustigis flikaĵon el silkopeco de malsama koloro, fortranĉita el la malnova pluvombreto; kaj la postan tagon Orelo foriris, humil-miene, kun la flikita instrumento. Li enmetis ĝin en sian ŝrankon, kaj pensis nur pri ĝi, kiel oni pensas pri ajna aĉa memoraĵo.

Sed vespere, apenaŭ li revenis, lia edzino ekkaptis lian pluvombreton el liaj manoj, malfermis ĝin por kontroli ĝian staton, kaj ŝi restadis sufokiĝinta antaŭ neriparebla katastrofo. Ĝi estis disborita kovrita per etaj truoj, kiuj evidente devenis de bruldifektoj, kiel se sur ĝin oni malplenigis la cindron de brulanta pipo. Ĝi estis komplete difektita senrimede ripareble.

Ŝi rigardadis tion, neniun vorton dirante, tro indignigata por eligi sonon el sia gorĝo. Li ankaŭ, konstatante la damaĝon, restadis stulta, timegata, konsternata.

Poste ili sin rigardis reciproke; poste li mallevis la okulojn; poste li ricevis sur la

vizaĝon la boritan objekton, kiun ŝi ĵetis al li; poste ŝi kriis, retrovante sian voĉon en furioza kolero:

– Ha! kanajlo! kanajlo! Vi intence faris tion! Sed tion vi repagos al mi! Pluvombreton vi ne plu havos...

Kaj la geedza sceno rekomenciĝis. Post unu horo de tempesto, fine li povis pravigi sin. Li ĵuris, ke li nenion komprenis; ke tio povis nur deveni de malbonvoleca aŭ venĝema ago.

Sonorilvoko liberigis lin. Estis amiko, kiu venis por vespermanĝi.

S-ino Orelo submetis la kazon al li. Koncerne aĉetadon de nova pluvombreto, tio estis finita, ŝia edzo ne plu havos tion.

La amiko prudente argumentis:

– Tiam, sinjorino, li difektos liajn vestaĵojn, kiuj evidente pli multe valoras.

La malgranda virino, ĉiam furioza, respondis :

– Tiam li prenos kuirejan pluvombreton, mi ne donos al li novan el silko.

Je tiu penso, Orelo ribelis.

– Tiam mi demisios! Sed mi ne iros al la Ministerio kun kuireja pluvombreto.

La amiko reparolis :

– Faru regarni tiun ĉi, tio ne multekostas.

S-ino Orelo, furiozigata, balbutis :

– Necesas almenaŭ ok frankojn por fari ĝin regarni. Ok frankoj kaj dek ok frankoj faras dudek ses! Dudek ses frankojn por unu pluvombreto, sed tio estas frenezaĵo! Tio estas ekstravaganco!

La amiko, malriĉa burĝo, estis bone inspirinta :

– Pagigu tion per via Asekuro. La asekuraj kompanioj pagas la brulintajn objektojn, kondiĉe ke la damaĝo okazis en via loĝejo.

Post tiu konsilo, la malgranda virino tute kvietiĝis; kaj post minuta pripensado, ŝi diris al sia edzo :

– Morgaŭ, antaŭ ol iri al via Ministerio, vi vizitos la oficejojn de "La Patrino", por

konstatigi la staton de via pluvombrelo, kaj insiste peti la pagon.

S-ro Orelo eksaltis.

– Dum mia tuta vivo, neniam mi aŭdacos! Dek ok frankoj estas perditaj, jen la tuto. Ni mortos pri tio.

Kaj la postan tagon, li eliris kun marŝbastono. Feliĉe, estis bela vetero.

Restante sola hejme, S-ino Orelo ne povis konsoliĝi pri la perdo de siaj dek ok frankoj. La pluvombrelo estis sur la tablo de la manĝoĉambro, kaj ŝi turnis ĉirkaŭ ĝi, ne sukcesante decidiĝi.

Ŝi senĉese pensis pri la Asekuro, sed ŝi ankaŭ ne kuraĝis alfronti la mokemajn rigardojn de la sinjoroj, kiuj akceptos ŝin, ĉar ŝi estis timida antaŭ la mondumo, ruĝiĝante por nenio, embarasata tuj post kiam ŝi devis paroli al nekonatuloj.

Tamen la postsopiro koncerne la dek ok frankojn suferigis ŝin, kiel vundo. Ŝi ne plu volis pensi pri tio, sed la memoro pri tiu malprofito dolore martelis ŝin. Tamen kion fari? La horoj pasis; ŝi decidis nenion. Poste, subite, kiel la malkuraĝuloj kiuj fariĝas bravuloj, ŝi decidiĝis:

– Mi iros, kaj mi ja vidos !

Sed unue necesis, ke ŝi pretigu la pluvombrelon, por ke katastrofo estu plena, kaj la kaŭzo facile defendebla. Ŝi ekprenis alumeton sur la kameno, kaj faris, inter la barto, grandan bruldifekton, larĝan kiel la mano; poste ŝi delikate rulis tiun, kiu restis de la silko, fiksas la restaĵon per la elasta ŝnureto, surmetis sian ŝalon kaj sian ĉapelon, kaj rapidpaŝe malsupreniris la straton de Rivoli, en kiu troviĝis la Asekuro.

Sed, samtempe kiam ŝi alprosimiĝis, ŝi malrapidigis sian irmanieron. Kion ŝi tuj diros? Kion oni tuj respondos al ŝi?

Ŝi rigardis la domnumerojn. Ŝi havis ankoraŭ dudek ok numerojn antaŭ ŝi. Bonege! Ŝi povis pripensi. Ŝi iradis malpli kaj malpli rapide. Subite ŝi ekstremis. Jen la pordo, sur

kiu brilas oraj literoj: « La Patrino, Asekura Kompanio Kontraŭ la Incendio. » Jam! Ŝi haltis dum momenteto, anksia, honta, poste preterpasis, poste revenis, poste denove preterpasis, kaj poste ankoraŭ revenis.

Fine ŝi diris al si :

– Tamen, endas ke mi eniru. Pli bone estas frue ol malfrue.

Sed, penetrante en la domon, ŝi sentis, ke ŝia koro pulsatis.

Ŝi eniris en vastegan ĉambron, kiu havis giĉetojn sur ĝia tuta periferio, kaj ĉe ĉiu giĉeto, oni ekvidis virkapon, kies korpo estis maskita per dratreto.

Sinjoro aperis, kunportante paperojn. Ŝi haltis, kaj per timida voĉeto :

– Pardonu, sinjoro, ĉu vi povus diri al mi, kien oni devas sin direkti por repagigi al si la brulintajn objektojn.

Li respondis per sonora voĉo :

– Unuan etaĝon, maldekstre. En la oficejo de la sinistroj.

Tiu vorto ankoraŭ plimulte timigis ŝin; kaj ŝi emis fuĝi, nenion dirante, rezignante siajn dek ok frankojn. Sed la penso pri tiu sumo, rekuraĝigis ŝin, kaj ŝi supreniris, spirmanka, haltante ĉe ĉiu ŝtupo.

En la unua etaĝo, ŝi ekvidis pardonon, ŝi frapis. Klara voĉo ekkriis :

– Eniru!

Ŝi eniris, kaj ŝi troviĝis en granda ĉambro, en kiu tri sinjoroj, starantaj, ordenitaj, solenaj, interbabilis.

Unu el ili demandis al ŝi :

– Kion vi deziras, sinjorino ?

Ŝi ne plu trovis siajn vortojn, ŝi ripetbalbutis :

– Mi venas... mi venas... por... por sinistro.

La sinjoro, ĝentila, indikis seĝon.

– Bonvolu sidiĝi, mi estos je via dispono post unu minuto.

Kaj, sin turnante al la du aliaj, li daŭrigis la konversacion.

– La Kompanio, sinjoroj, ne kredas sin deviginta rilate al vi por plimulte ol kvarcent mil frankojn. Ni ne povas akcepti viajn depostulojn koncerne la cent mil frankojn, kiujn vi plie pretendas pagigi al ni. Cetere la taksado...

Unu el la du aliaj interrompis lin :

– Sufiĉas, sinjoro, la tribunaloj decidis. Ni povas fari nenion alian ol foriri.

Kaj ili eliris post pluraj ceremoniaj salutoj.

Ho! Se ŝi aŭdacus foriri kun ili, ŝi farus tion; ŝi fuĝus, forlasante la tuton! Sed ĉu ŝi povus fari tion? La sinjoro revenis, kaj diris kliniĝante :

– Kiel mi povas helpi al vi, sinjorino?

Ŝi malfacile artikulacis :

– Mi venas por... por tio.

La direktoro mallevis la okulojn, kun naiva miro, al la objekto, kiun ŝi aletendis al li.

Ŝi provadis, per tremanta mano, demeti la kaŭĉukan ŝnureton. Post kelkaj klopodoj, ŝi sukcesis, kaj abrupte malfermis la ĉifonan skeleton de la pluvombrelo.

La viro, per kompata tono, eldiris :

– Ĝi ŝajnas al mi ja malsana.

Ŝi hezite deklaris :

– Ĝi kostis al mi dudek frankojn.

Li miris :

– Vere! Tiom multekosta!

– Jes, ĝi estis bonega. Mi volis konstati al vi ĝian staton.

– Bonege; mi vidas. Bonege. Sed mi ne komprenas tion, kio povas koncerni min.

Maltrankvilo ekkaptis ŝin. Eble, ke tiu kompanio ne pagu la etajn objektojn, kaj ŝi diris:

– Sed... ĝi estis bruligita...

La viro ne neis :

– Mi ja vidas tion.

Ŝi gape restadis, ne plu sciante kion diri; kaj, subite, ekkonscianta pri sia forgeso; ŝi rapidege prononcis :

– Mi estas S-ino Orelo. Ni estas asekurataj ĉe "La Patrino", kaj mi venas por postuli al (de) vi la prezon de tiu damaĝo.

Ŝi hastis aldoni, pro la timo de firma malkonsento:

– Mi nur demandas, ke vi regarnigu ĝin.

La direktoro, embarasata, deklaris :

– Sed... sinjorino... ni ne estas ombrelvendistoj. Ni ne povas zorgi pri tiaj flikadoj.

La malgranda virino sentis reveni sian memfidon. Endis barakti. Do ŝi baraktos! Ŝi ne plu timis; ŝi diris :

– Mi nur petas, ke vi pagu al mi la prezon de la flikado. Mi mem ja farigos ĝin.

La sinjoro ŝajnis konfuzita.

– Vere, sinjorino, por tia ripareto. Neniam oni postulas monkompenson de ni por akcidentoj, kies graveco estas tiel malgranda. Konsentu pri tio, ke ni ne povas repagi, la poŝtukojn, la gantojn, la balailojn, la pantoflojn, ĉiujn etajn objektojn, kiuj riskas ĉiutage suferi averiojn per fajro.

Ŝi fariĝis ruĝa, sentante la koleron invadi ŝin :

– Sed, sinjoro, en la lasta monato decembro, ni suferis kamenfajron, kiu kaŭzis almenaŭ kvincent frankojn da damaĝoj; S-ro Orelo nenion reklamaciis al la kompanio; tial estas ja justa, ke hodiaŭ ĝi pagu al mi mian pluvombreton!

La direktoro, divenante la mensogon, ridetante diris :

– Vi malkontestos, sinjorino, ke estas ja mirinde, ke S-ro Orelo, kiu nenion postulis por damaĝo je kvincent frankoj, venu por postuli la repagon de pluvombrela flikado je kvin aŭ ses frankoj.

Ŝi tute ne konsterniĝis, kaj replikis :

– Pardonu, sinjoro, la damaĝo je kvincent frankoj koncernis la monon de S-ro Orelo, dum la damaĝo je dek ok frankoj koncernas la monon de S-ino Orelo, kaj tio ne estas la sama afero.

Komprenante, ke ŝi ne forlasus lian officejon, kaj li estis perdonta sian tagon, li rezignacie demandis :

– Nu, bonvolu diri al mi, kiamaniere la akcidento okazis.

Ŝi sentis la proksiman venkon, kaj ekrakontis :

– Jen, sinjoro: mi posedas en mia vestiblo ian aĵon el bronzo, en kiu oni metas la pluvombrelojn kaj la marŝbastonojn. Do antaŭ kelkaj tagoj, enirante, mi enen metis la pluvombrelon. Endas diri al vi, ke ĝuste super estas tabuleto por meti la kandelojn kaj la alumetojn. Mi aletendas la brakon, kaj mi ekprenas kvar alumetojn. Mi frotas unu; ĝi fuŝas. Mi frotas alian; ĝi ekbrulas kaj tuj estingas. Mi frotas la trian; ĝi faras la samon.

Le direktoro interrompis ŝin por meti spritaĵon :

– Ili do estis alumetoj de la registaro*, ĉu ?

Ŝi ne komprenis, kaj daŭrigis :

– Tio povas esti. Ĉiuokaze estas, ke la kvara flamiĝis, kaj mi eklumigis mian kandelon; poste mi eniris en mian dormoĉambron por enlitiĝi. Sed post kvaronhoro, ŝajnis al mi, ke io bruloduris. Mi ĉiam timas la fajron. Ho! Se iam ni suferus sinistron, tio ne estus mia kulpo! Des pli, ke ekde la kamenfajro, pri kiu mi parolis al vi, mi angoras. Do mi ellitiĝas, mi eliras, mi serĉas, mi flaras ĉie kiel ĉashundo, kaj fine mi ekvidas, ke mia pluvombrelo brulas. Probable ke alumeto falis enen. Vi vidas en kia stato tio igis ĝin...

La direktoro rezignaciis; li demandis:

– Je kiom vi taksas la damaĝon ?

Ŝi restis senparola, ne aŭdacante difini prezon. Kaj ne volante troabunde, ŝi diris :

– Faru regarni ĝin vi mem. Mi fidas al vi.

Li malakceptis:

– Ne, sinjorino, mi ne povas. Diru al mi kiom vi petas.

– Sed... ŝajnas al mi... ke... Nu vidu, sinjoro, mi ne volas fraŭdi vin, mi... ni tuj faros aferon. Mi kunportos mian pluvombrelon al fabrikisto, kiu regarnos ĝin per bona silko, per daŭra silko, kaj mi alportos al vi la fakturon. Ĉu tio taŭgas al vi ?

– Perfekte, sinjorino, konsentite. Jen la noto por la kasisto, kiu repagos vian elspezon.

Kaj li aletendis karton al S-ino Orelo, kiu ekkaptis ĝin, poste ŝi stariĝis, kaj dankante eliris, hastante troviĝis ekstere, pro la timo, ke li ŝanĝu la decidon.

Nun ŝi gajpaŝe iradis tra la strato, serĉante pluvombrelan komerciston, kiu ŝajnus al ŝi eleganta. Kiam ŝi trovis butikon, kiu aspektis riĉa, ŝi eniris, kaj per aplomba voĉo diris :

– Jen pluvombrelo, kiu bezonas renovigon per silko, per tre bona silko. Uzu tion, kion vi havas pli bone. Mi ne domaĝas la elspezon.

La 10an de februaro 1884

**Inter 1872 kaj 1992, en Francio, la fabrikado de alumetoj koncernis monopolon de la Ŝtato.*

esperantigis



Noël Lecomte

(Francujo)



◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto, Chongqing, 400020, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇